Ludwig Lazarus Zamenhof,

Дорога

tradukita de Соломон Наумович Высоковский

Сквозь мрак неприятья мы движемся к цели -
Народов земли единенью.
Та цель, как маяк, что спасает от мели,
От распрей ведёт к примиренью.
Нас тьма не страшит, что рождает кошмары,
Насмешки толпы, поражений удары.
Наш путь нами выбран, для нас он прекрасен:
Он - прям, он - победен, он - ясен
Дорогой, упорством пробитой.
Так малые капли, что бьют непрестанно,
Сильнее любого гранита.
Надежда, упорство - вот наше богатство
И символы знамени нашего братства.
Мы цели достигнем, идя шаг за шагом,
Под нас единяющим флагом.

. . .

Ludwig Lazarus Zamenhof,

La vojo

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek mokoj de l'homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' difinita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo posto paŝo, post longa laboro
Atingon la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas -
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas -
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas -
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos!"

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantaj foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton kaj, repurigitaj
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam via bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

. . .

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo posto paŝo, post longa laboro
Atingon la celon en gloro.

Traduko de la Esperanta poemo "La vojo" de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14) en la Rusan de Соломон Наумович Высоковский .*

Arg-969-1956 (2014-03-05 22:20:50)

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-969-1950 (2014-03-01 10:57:16)